# *Kubo kaj Nederlando pledas por ampleksigi negocojn kaj komercon*



Komerca misio de Nederlando kunsidis en Havano dum forumo de negocoj kun kubaj entreprenistoj por taksi la reciprokajn interesojn, depost esti informite ke la multnacia entrepreno Unilever faros milionan investon kun la kuba firmao InterSuchel.

La? sciigis la nederlanda ministro Lilianne Ploumen, oni atendas ke “la entreprenoj kaj organiza?oj ?eestantaj la mision, ampleksigu kaj fortigu sian reton de kontaktoj kaj povu esplori la eblecojn de negocado kaj kunlaboro”.

La ministro pri ekstera komerco kaj kunlaboro al evoluo de Nederlando gvidas delegitaron formitan de 77 kompanioj kaj organiza?oj el diversaj sektoroj, interalie, de gravaj firmaoj kiel Philips, Unilever kaj Heineken.

?i anka? vizitis la specialan evoluzonon de Mariel (ZED), kie partoprenis la oficialan ceremonion kiu konfirmis la rajtigon de la insula registaro por konsistigi la miksan entreprenon Unilever Suchel S.A kaj ties establigo kiel uzanto de la ZED.

La miksa institucio efektivigos investon je pli ol 35 milionoj da dolaroj por konstrui modernan fabrikon por produkti varian specon de produktoj por persona higieno kaj hejmaj puriga?oj el grava presti?o internacia kiel Rexona, Omo, Lux kaj Close-up; ?i startos fine de 2017, klarigis la prezidanto de la firmao por Meksiko kaj Karibio, Fabio Prado.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/81166-kubo-kaj-nederlando-pledas-por-ampleksigi-negocojn-kaj-komercon

# Radio Habana Cuba